

JEN



MEDITERANEA PEJZAĜO

Pedagogio, estas la scienco, kiu celas enigi en la cerbon *ion ajn*.



NE ABONU ANKAŬ

PAPITU'n

Kataluna satira karikaturo gazeto.
Aperas ĉiusemajne.



ABONO :

Hispanlando: jarkvarono. 2 Ptoj.

Fremdlando: > 3 >

PELAYO, 35 - BARCELONO

Neniu malbona esperantisto legas la

"FRANCA ESPERANTISTO," n,

KIUN ONI ABONAS EN

46, BOUEVARD MAGENTA, PARIS

JEN

akceptas

Postmarkojn

de ĉiu nacio por la pago de l'abono

UJEN

SENKULPIĜO

La tuta naturo ĝojiĝadis per la freŝeco de la mateno; la papilioj flirtadis ĉirkaŭ la floraj pokaletoj; milo da birdoj pepadis tra la spaco klopodante por la nesto kun pajlero ĉe la beko; dolĉe fluadis la rivero, kaj fluto de malproksima paŝtisto substrekis la kvietecon de la kamparo per siaj melodiaj arioj.

La monta vilaĝo, kies preĝeja sonorilejo montriĝadis preter la supro de la densa branĉaro de olivarbaro, sendadis siajn bruojn de dormanta domaro. La batoj de la ferajisto sur la amboson, la sono de la sonoriloj vokantaj al la preĝo, la tinto de tintiletoj de jungiloj, ŝoviĝadis mallaŭte tra la aero.....

En tiu granda kvieteco kaj trankvilejo loĝadis riĉa terposedanto, filo de negrovendisto, kiu heredis de

sia patro dek duon da montoj, centon da domoj, milojn da frankoj kaj multkoloran papagon pli paroleman ol deputato de iea ajn Parlamento. Tiu malfeliĉa birdo estis, eble, la sola suferanta estaĵo, el la trankvilega kamparo. Vane, ĉiumatene, ĝiaj gemastroj, regalis ĝin per plej bongusta ĉokolado kaj boligitaj terpomoj; vane ili elektadis por ĝi la plej freŝajn foliojn de cikorio. Tiuj frandaĵoj ne sufiĉis por malaperigi la doloron, kiu kaŭzadis al ĝi la malproksimeco de ĝia ekvatora lando. Ve all ĉiutaga sopirado al la palmoj kaj kokusarboj! ĉiumomenta bedaŭro al la mangloj kaj tamarindoj! ĉiusekundaj larmoj al la tradoj kaj al la flava febrol

Imagu nin en kaĝo pendanta de kokusarbo ĉirkaŭita de kabanaj kaj indiĝenoj dancantaj la «cake walk» 'onl Kia sopirado al la kunvenoj de la sekcio de Montmartrol! Kiom da bedaŭraj larmoj al la venonta Kongreso!... Tamen homo kutimiĝas pli malpli frue al ĉiu malfeliĉo. Birdo, male, eĉ kiam ĝi estas kapabla paroli kiel homo,

kutimiĝas neniam. Tial la multkolora papago de la heredinto de l' nigrovendisto, klopodis senhalte, konplotis senripoze por la forflugado, kaj unu matenon, kiam ĝiaj gemastroj forgesis la kaĝpordon malfermita, ĝi eligis la bekon, post la beko la kapon kun ĝia eleganta tufo, kaj post la kapo la korpon kun ĝiaj flugiloj, kiuj enviigis nian faman Archedeacon, kaj dirinte adiaŭ —ĉar ĝi estis bonege edukita— li forflugis al la arbaro, kaj haltis sur branĉo por plezure rigardadi kaj flaradi la aspekton kaj bonodoron de la libereco.

* * *

Tiun saman matenon, Petro, vilaĝano de la alia flanko de l' montaro, formarŝis al ĉasado kun la pafilo sur sultro, kaj ĝoja



—Ĉu vi scias? Oni ĵus diris al mi, ke Doktoro Ulo mortigis sian bopatrinojn per du pafoj.

—Kia malspritulo! Ĉu li, kuracisto, bezonis fari tiom da bruoj?



NEGRAVAJ DIFERENCOJ

—Interpaciĝu fine! Nu! Ni ĉiuj konsentas! Ne leteron sed karton ni sendos al ii dirante, ke li estas kanajlo, ĉar li uzis la prefikson *mis*.....!

fajfo sur lipoj. Post du horoj da marŝo, Petro nenion pafindan vidinte, sin pretigis kunruli cigaredon ripozante ĉe tronko de kverko. Sed, kia estis lia surprizo, kiam starantan sur branĉo li vidis la multkoloran, la neniam de li viditan nek imageblan papagon!

Rapide li pretigis la pafilon, ŝargis ĝin, kaj apudigis la koblon al la ŝultro kaj vango.

—Bonega pafilo! pensis Petro.

Sed al la bruo turnis la kapon la papago, kaj afable, kutime, alsendis al la kamparano sian plej ceremonian saluton:

—Bonan tagon, bonan tagon! —raŭkis la papago...

Ne pli tremetas folio blovata ĉe branĉo, ol tremis Petro ĉe la neatendita parolo de la celpafoto. Li mal-suprenigis la pafilon, formetis sian ĉapon, kaj per plej respekta voĉo li diris ceremonie sin klinante:

—Pardonu sinjoro! Mi kredis, ke vi estas birdo!

La Kometo de Halley

Estas iaj ŝercoj vere tre malagrablaj; ekzemple, la elpenso de la kometo de Halley. Ni diras *kometo*, kaj tiu *eto* impresas niajn orelojn per stranga sono. Efektive, ni preferus nomi *komego* tiun astregon, kiu venos vostofrapi nin, kiel baleno vostofrapas kanoteton de harpunistoj. Plie la ideo de *komo*, ŝajnas al ni ne tre ĝusta, parolante pri stelo, kiu venos meti *punkton* al la homa historio.


Ĉu kometo, komego, komedo, stelo, vostulo, vostaĵo, aŭ punkto, ĉiel, la ŝerco de sinjoro Halley ne estas tro aplaŭdinda. La elpenso de detruema kometo similas la ŝercon de tiuj delikatuloj, kiuj deflankigas vian seĝon, kiam vi intencas eksidi. Nun, kiam Homaro komencis esti iom homa kaj humana; nun, kiam la homo



—Tre strange! Oni konsilis min lerni Esperanton, kaj aĉeti defendan hundon por la okazo, kiam mi uzos novan vorton!

komencis ŝati la observadon de la steloj, kaj eĉ elpensis la kvinpintan stelon de Esperanto, ne ŝajnas tro ĝustatempa la venigo de tiu malagrabra vizitonto elpensita de sinjoro Halley.

Ni esperas, ke la multaj astronomoj, kiuj honoras la esperantistaron, uzos la fortopovon de siaj teleskopoj por malhelpi la malfeliĉan finon de nia ekzistado.




—Li ĉasis en Afriko, kiel sinjoro Roosewelt, kaj kunportis
sovaĝan tigron kaj mildan kaprinon.
—Kompreneble,... en apartaj kaĝoj...?
—La tigron nur.



Finigo de bilanco: —Se almenaŭ oni venus prezenti la fak-
turon, mi povus mortigi la enspeziston!



—Ĉu via unujara infano jam paŝas?
—Jam de post tri monatoj.
—Diable! Li ja devas esti tre malproksime!



La hispano: —Ĉe ni, neniam la Suno subiris!
La kataluno: —Jen, kio okazas ĉe ni aŭtoraŭ kun la.....
—luno.



noe
-09-

- Ni denove marŝadu...! En tiu vilaĝo oni povas nek rabi nek gajni al si la vivon!



LAI5

ANKORAŬ «CHANTECLAIR»

—Jam antaŭ longe, koko estis pritraktata en la esperantista teatro.
La jokeo (malestime) —Jes, sed ĝi estis «koko sen spronoj»!

«CHANTECLAIR» MANIO



- Mi estas certa, ke Rostand havus pli grandan sukceson, se anstataŭ koko, li prezentus meleagron.
—Kial?
—Krom la vosto, ĝi estas, kio pli similas pavon!
—Ne estu... merlino!



Ora junularo!



— Mi kredas, ke vi, sanigistoj, gajnas multe da mono.
 — Ne kredu! La kuracistoj faras al ni gravan konkurencon!

Karnavalo!


Ĝi pasis, kiel ĉiu jaro, kun sia sekvantaro de stranguloj. Vizaĝoj pentritaj per vina feĉo, maskoj, simboloj, fremdecaj roboj kaj kostumoj, krioj, kantoj, dancoj, kavalkadoj.....! Bakuso ridetas komplate. La strataj filozofoj interfingras la manojn kaj plendas: kial fari karnavalon? ĉu la tuta jaro ne estas karnavalo?

La frazo havas bonan krediton, kaj JEN profitus ĝin,

se JEN ne timus fariĝi serioza. Kia bonega okazo por tondri kontraŭ ĉiu tutjara maskito!.... JEN preferas ride-ti komplate, kiel Bakuso, kaj serioze daŭri en la verkado de fablo pri malpacema simio, kiu sin pentris verde, kaj kredis simili esperantiston. Azeno pasis, kaj manĝis ĝin. La malfeliĉa azeno, kredis ke la simio estis cikorio!

Kompreneble, la spriteco de la fablo ne mallumigos La Fontainon, sed la rango de niaj simioj ankaŭ ne postulas tiom gravan priskribanton!





—Por kio, mi, barbiro, bezonas Esperanton? Ĉu fremdulo ne povas bonega montri al mi siajn dezirojn per gestoj?

—Eble; sed kiam vi tro tondis la harojn al fremdulo, kiamaniere li povas klarigi al vi per gestoj, ke vi lasu al li la harojn iom pli longaj?

NE ABONU LA GAZETON

Unu jaro . . . 3 Fr. (1,200 sm.)

Jarduono . . . 2 » (0,800 sm.)

JEN

Eldonisto: RAMON FARRÉ. str. Portaferriça, 17, BARCELONO. (Li petas, oni faru la pagon per la ĈEKBANKO ESPERANTISTA • Merton Abbey. LONDON SW.)

REPREZENTANTOJ.

- G. Warnier, «Librairie de l'Esperanto» 15, rue Montmartre, Parizo.
- Möller & Borel, «Esperanto Verlag» 18/19, Lindenstr. BERLINO SW.
- Andr. Fred. Host & Son, Kg. L. Hofboghandel. Bredgade, 35, KJOBENHAVN.
- «The British Esperanto Association» Museum Station Buildings, 133-6, High Holborn, LONDON. WC.
- Kiosko 77^a, 10. Boulevard Capucines. PARIS



HUMORO DE L'AVOJ

James Gilray, angla karikaturisto de la XVIII^a jarcento.

Kun la radianta apero de la angla pentrado en la jarcento XVIII^a, naskiĝis ankaŭ ĝia komplemento la gravurarto, kaj je la mezo de la jarcento, la arto de la karikaturo, kiu, kvankam ne tiel ŝatinda kiel en Francujo, havis inteligentajn kaj delikatajn interpretistojn, nome: Rowlandson, Hogarth, Bunbury, Cruickshank, Ansell, West, Woodward, kaj speciale tiun James Gilray, kiun ni prezentas hodiaŭ al niaj legantoj.

Gilray naskis cirkaŭ la jaro 1751. Liaj bildoj, desegnitaj kaj gravuritaj de li mem, pasiigis liajn samlandanoj, kiuj eltiradis ilin el la manoj de la eldonisto Humprhey, riĉigante unu kaj alian.

La parto pli fama el liaj verkaro estis la napoleona karikaturo. Bonaparte estis la priokupaĵo de la angloj; tial, kiam oni elmontradis liajn satirojn kontraŭ la *Korsa Gulliver* aŭ kontraŭ liaj ministroj kaj generaloj,

la londonanoj entusiasmigintaj preskaŭ revoluciigadis antaŭ la butikaj tenestroj de Humprhey.


Alia aspekto, eble pli delikata, de lia arto, estas la politika karikaturo angla kaj speciale lia fildito titolita «Sekreta edziĝo de Princo de Wales kun Mrs. Herbert.»

Tiuj karikaturaj de modoj estas tria aspekto de lia verkaro, eble la plej delikata kaj dekokjarcenta el ĉiuj. Ni estimas ilin multe pli ol la aliajn pro la esluvo, kiujn ĝi transsendas al ni, de ĝentila afero mortinta, de *arĥeologia gracia*, de fremda virineco, de valso de klavokorto, aŭ de muzika skatolo, de punktoj kaj falbaloj jaroplenaj, eligitaj el la fundo de barokaj ŝrankoj.

Tiu artisto mortis mizera, freneza kaj alkoholizita la jaron 1815^{an}.



Karikaturaj pri la modo de plumoj.



Karikaturaj pri la modo de plumoj.

FREMDA HUMORO

GERMANUJO


Karikaturoj de Olaf Gebrausson



Anatole France



Engelbert Humperdink



Octave Mirbeau



Edward Grieg



Björsterne Björson



Reinhold Begas

LA FIRMO

HACHETTE KAJ K^{IO}

79, Boulevard Saint - Germain

Paris

APERIGOS BALDAŬ

VORTARON

Esperanto Esperantan

DE KABE

NE AĈETU ĜIN ANTAŬ OL ĜI ESTOS APERINTA

ĈIUJ ESPERANTISTAJ GEJUNULOJ

ĈIUJ ESPERANTISTOJ DEZIRANTAJ CERTIGI LA ESTONTON DE ESPERANTO

DEVAS LEGI, ABONI, KONIGI LA GAZETON

JUNECO

Oficiale elektitan, ĉe la Barcelona Kongreso, kiel organon por la ĉiulandaj Esperantistaj gejunuloj

JUNECO publikigas propagandajn artikolojn, Kurson de Esperanto, literaturaĵojn plej bone redaktitajn Ĝi estas malfermita al la konkursojn.

KUNLABORADO DE ĈIUJ SIAJ ABONANTOJ

JUNECO estas la Sola Esperantista gazeto, kiu publikigas plenan Kronikon pri la tutmonda Esperanta movado ĉe la gejunuloj. Specimeno senpage ricevebla

Jara Abono. 4 Fr.

Franclando. 5 Fr

Kune Kun «Franca Esperantisto». 6 Fr.

Administrejo: 152 B¹-Raspail. — PARIS



—Jam de tri tagoj mi lernas Esperanton, kaj ankoraŭ nenia fremdulo promesis al mi edzinigon!!